




Kulturaj Kajeroj

E. MAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Simpla : 3 fkoj

Subtena : 5 fkoj

Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri

Kulturaj kajeroj

Epineux-le-Seguin (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4)

JANUARO - FEBRUARO

1962

1

KULTURAJ KAJEROJ

1962

Januaro - Februaro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

..

Nia tempa Problemo :

Reklamo kaj informo.

Esperanto tra la Mondo.

Turismo :

Vojaĝo tra Provenco (V) Marsejlo.
F. Garrigue.

Alternativo por la Esperanto-movado.

R. Watier.

Intervjuo de Roland DUPUIS.

El ie en la mondo :

Pri la jugoslavia lernejsistemo. (E. Lapenna).

Kiam regas la malgranduloj : La termitoj.

Por via distro :

Nia konkurso.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

REKLAMO KAJ INFORMO

Antaŭ kelkaj tagoj mi prezentis al geamikiĝoj diapositivon pri vojaĝoj kiujn mi faris. Sufiĉe bonaj ili estis, ofte belegaj la pejzaĝoj aŭ konstruaĵoj. Sed apud la kastelo Urquhart, sur la bordo de Loch Ness aperis ŝafejo kovrita per rustiginta ferlato; apud la floroj, sur la kajoj de Amsterdamo, staris signalfosto pri unuvoja trafiko; transverse de la katedralo de Rouen aperis elektraj dratoj, kaj bela rivera valo estis makulita de reklamo pri fama restoracio.

Cie montriĝas la stampo de la progreso, ofte benita de la homoj, sed ofte ankaŭ malbenita. Necesaj estas la elektraj dratoj, necesaj la signalfostoj, sed kion pensi pri la reklam-paneloj, kiuj staras sur la voj-bordoj, ofte inter vi kaj la pejzaĝo?

La plej grava punkto eble ne estas la ekzistado de paneloj diversaj ie ajn en la naturo sed la kialo de tiu svarmato de reklamiloj. Ili apartenas al nia ĉiutaga vivo. Ni trovas ilin sur la strato, en la trajno aŭ la aŭtobuso, en la gazeto aŭ la revuo, kiun ni foliumas. Ni revenas hejmen kaj deziras trovi ripozon. Ni aŭskultas la radion aŭ rigardas la televidon: tuj post la koncerto (kelkafoje eĉ meze de ĝi), inter la prezentado de la vivo de la Amazon-Indianoj kaj la prezentado de la lasta ekspozicio pri floroj, voĉo memorigas nin pri la mirinda povo de tiu aŭ tiu ĉi sapo, kiu igas la ĉemizojn « ankoraŭ pli blankaj ». La reklamo perfortis nian pardonon. Eĉ en nia hejmo oni provas « kondiĉigi » nian spiriton.

La celo de reklamo estas konigi al la publiko la ekziston de tiu aŭ tiu ĉi produkto. Tiu celo

estas laŭdinda. Sed la rimedoj ne ĉiam estas gratulindaj. Jam antaŭ kvardek jaroj amerika verkisto rimarkigis ke « reklamo grandparte agigas ĉion surfacan kaj snoban en ni ».

Reklamo fariĝis scienco. Oni studas la « kialon » de niaj agoj por direkti nian elekton. Kaj plej ofte oni sukcesas. Kiam temas pri elekto inter diversaj specoj de sapo, de dentopasto aŭ de minerala akvo, ne tro gravas. Sed kiam temas pri elekto inter ideoj, sistemoj aŭ homoj kiuj devos gvidi grupon, asocion aŭ eĉ landon, la reklamo (en tiu kazo nomita propagando) estas bedaŭrinda. Koncerne ideojn oni havas la devon informi, oni ne rajtas reklami. La homo devas elekti post propra aprezado de informoj sed ne obei la influojn de reklamo.

Sed ŝajnas, ke reklamo estas fakto de nia jarcento. Necesas estas honesta informado pri ideoj. Por eviti ke informado fariĝu reklamado ekzistas nur unu rimedo: kulturo.

P. B.

o—o

Kun logiko kiun vi certe ŝatos ni informas vin ke, en Grésillon, okaze de la Kulturaj Internaciaj Ferioj, de la 3a ĝis la 17a de Julio, inter aliaj valoraj prelegistoj, S-ro R. Dupuis (vidu intervjuon en tiu ĉi numero) parolos pri la grandaj komponistoj Liszt, Chopin, Beethoven kaj ilustros siajn prelegojn per pianomuziko kaj lumbildoj. Nova okazo por pliriĉigi viajn konojn kaj ĝui aĝrablegajn momentojn.



Kun sama logiko ni informas vin ke...

... ĉie, ĉiam, ĉiel, ĉiuj legas « Kulturaj Kajeroj »n.

Esperanto tra la Mondo



Kien vi iros en 1962

Jam ni anoncis la Universalan Kongreson de Esperanto, en Kopenhago (4-11-8) kaj la antaŭ-kongreson en Helsinger.

Ni menciuj nun :
— Ankaŭ tuj antaŭ la kongreso : la 18an Internacian Junularan Kongreson, en Frederikshavn ;

— Geografian Semajnon en Odense (Danujo), 28.7 - 4.8. Adreso : R. kaj P. Thorsen, Dyblandsvangen 7, Kopenhago, Brh.

Ankaŭ okazos :
— Kultura Prelegsemajno, en Frostavallen (Svedujo), 12-19-8. Adreso : S-ro Jan Stronne, Amiralsgatan 36, Malmo.

— Internacia kongreso de la katolikaj esperantistoj, en Romo, 14-21-8. Adreso : F-ino Elena Cipriani, via R. Bonghi 34, Romo.

— S.A.T.-kongreso, en Vienne (Aŭstrujo), 4-10-8. Informoj : Fünfhausegasse 16-18, Wien XV/101.

— Kongreso de la esperantistaj fervojistoj, en Budapeŝto (Hungarujo), 5-11-5.

— Internacia Ferio-Semajno, en Romans (Francujo), 20-27-7. Informoj : E-grupo, « Bona Stelo », 31, rue Pêcherie, Romans (Drôme).

— Aŭtunaj kursoj, en Vejle (Danujo), 15-22a de oktobro. Adreso : S-ro L. Friis, Ingemansvej 9, Aabyhøj.

— ...kaj pensu pri la aranĝoj en la Kulturdomo Grésillon !

Dum la Universala Kongreso : Konferenco de sciencistoj

« La lingva problemoj en la scienco » estos la temo de speciala konferenco de esperantistaj sciencistoj kiu okazos paralele al la Universala Kongreso en Kopenhago.

La Internacia Specimenfoiro de Barcelono...

... eldonis oficialan afiŝon en Esperanto. Petu ekzemplerojn de tiu afiŝo senpage al : Internacia Specimenfoiro, Propagandafako, Paseo de Maria Cristina, s/n Barcelona-4, Hispanujo.

En Ĉinio

Ekde la kuranta lernojaro, ankaŭ esperanto estas enigviciĝinta en la lernobjektoj de la Pekina Fremdlingva Kolegio.

Ĝi estas instruata kiel dua fremda lingvo al studentoj, kiuj ĝin elektis, kaj la kurso daŭros du jarojn.

« Karavano de Amikeco » tra Afriko

Sub patronado de Internacia Geografio Asocio, nia samideano Tibor Sekelj, fama esploristo, intencas gvidi tra Afriko, dum tri jaroj, « karavanon de Amikeco », kiu konsistos el 11 sciencistaj partoprenantoj, el 7 landoj ; la komuna lingva estos esperanto.

Propagandu per diapozitivaj !

Nia amiko Lentaigne (3, avenue de la Gailarde, Montpellier, Hérault, Francujo) proponas vendi al vi serion de diapozitivaj por ilustraj prelegojn pri esperanto. Skribu al li !

(Ni konas tiujn diapozitivajn : ili estas tute celtrafaj).

En la esperanta gazetaro

— Depost januaro, « Heroldo de esperanto » aperas sub nova gvidado : S-ro T. Jung « emeritiĝis » kaj la nova estrino estas S-ino Ada Fighiera-Sikorska.

— La itala dumonata katolika revuo « Nova Civito » publikigas nun ilustritan esperanto-elondon. Redakcio : Via della Scrofa 14, Romo.

U.E.A. aĉetis propran domon kaj translokiĝas

Pro minaco de malkonstruo de la luita domo, U.E.A. aĉetis vastan domon en Roterdamo. La domo havas 15 ĉambrojn kaj la estraro de U.E.A. kalkulas pri la malavareco de la esperantistoj por helpi la pagadon (jam, Kanadanino donacis la konsiderindan sumon de 5.000 gld por « pagi ĉambron » !).

Nur tri jarojn ĝis Tokio !

Kiel sciite, Universala Kongreso okazos en Tokio dum 1965. U.E.A. aranĝos komunan karavanon per aviadilo kaj estas la intenco resti en Japanio iom pli ol nur la kongressemajnon.

La kostoj, inkluzive de la kongressemajna restado, estos ĉirkaŭ 2.500 ned. gld. Por la ŝparantoj ĉe U.E.A. estas donata la rentumo de 3,5 %. Anoncu de nun vian principan partoprenon.

C.E.D. dekjara !

En « Esperanto » de januaro, aperis interesa artikolo pri la utiliga agado de la « centro de Esploro kaj Dokumentado », fondita antaŭ dek jaro de Dro Lapenna por centrigi kaj disendi ĉiujn fidindajn informojn pri nia movado.

Ankaŭ C.E.D. povas vivi nur dank'al la helpo materiala de la esperantistaro..

VOJAĜO TRA PROVENCO


V. - MARSEJLO

Ĉu li alvenu per la fervoja viadukto, ĉu li trairu per aŭtomobilo la deklivojn de la norda aŭtovojo, au ĉu li venu de la sudo kaj malsupreniru zigzage al la urbo de la altaroj de la Gardiole, la vojaĝanto estas ĉiam trafita de la subita vidaĵo de la grandioza pejzaĝo de Marsejlo.

Inter la du pintoj de terkapo Couronne, norde, ĝis terkapo Croisette, sude, la marsejla teritorio, pli ol 23 mil-hektara, triotio de la pariza, etendigas borde de golfo, kien enfluas rivereto Huveaune, signalizigas per arkipelago kun blankaj kiletoj : kastelo If, Frioul. Tiu golfo prezentas tridek-hektaran havenon.

En la centro de la urbo, apud tiu giganta maretendaĵo okcidente, tiu kolosa tereendaĵo oriente, trankvile ripozas Malnova Haveno. La legendo konfuzigas kun la historio, kaj superas ĝin. Sed, la legendo estas bela :

« En la jaro 600 antaŭ Kristo, la Focanoj, venantaj el Grekujo, sendas ekspedicion estratan de riĉa komercisto Protis. Ili vojaĝas per belaj ŝipoj je kvindek remiloj, la « pentekonteroj ». Ili haltas antaŭ golfo similanta tiun de Focco, en golfeto. Protis sin prezentas al reĝo Nann, estro de la sovaĝa gento loĝanta en la marborda regiono. Tiun tagon, Nann regas bankede en najbara groto. Ĉe la fino de la festeno, laŭ la figura rito, lia filino, Gyptis, elektos sian edzon per prezento al li de pokalo. La Focanoj estas invitataj. Je la dirita momento, Gyptis rondiras ĉirkaŭ la kunvenantoj



MARSEJLO : Fuorto Sankta Johano

(Foto René Simon).

en kiuj troviĝas multe da svatigantoj. Ĝi ofertas la pokalon al la juna greka estro, impresta de lia beleco. Nann akceptas. Li donas al Protis porcion da teritorio, kie la grekoj fondas novan urbon, Massalia, sur la norda parto de golfo nomata Lacydon, nun malnova Haveno. Tiel estis fondita Massalia, nepino de Ateno, filino de Foceo kaj de la amo.

Sieĝoj, raboj, incendioj falas sur Marsejlon pli ol sur ĉiun alian urbon. Certe Romo, Ateno kaj Arioso konservis siajn riĉajn historiajn monumentojn sed, dum ĉe ni la vivo estis ĉiutage pli intensa, dum la valoro de la grundo plikreskis, Romo, Ateno kaj Arioso fariĝis en la sekvanta jarcento kaj longtempe restis defaltintaj urboj.

Pro multaj malfeliĉoj plej diversaj eltenitaj de la urbo dum ĝia historio ni ne povas admiri la postrestaĵojn de ĝia pasinteco. La marsejla verkisto, Méry, skribis en la 19a jarcento ĉi-tiun spritaĵon : « Marsejlo posedas nur du monumentoj : la sunon kaj la maron ». Nur abatejo Sankta Viktoro datigas de la kvara jarcento. Ludoviko la dekkvara, pli ol mil jarojn poste starigis la fuortojn Sankta Nikolao kaj Sankta Johano, kiuj superstaras la maron kaj la urbon, por punegi la ribelantajn Marsejlanojn.

La plej grandaj transformiĝoj okazis en la dua parto de la 19a jarcento. Ili estas mirigaj : imagu en 1840, urbon kun 150.000 loĝantoj, ĉirkaŭpremita de ĝiaj malnovaj remparoj, malpura, maloportuna, bruema, kun nur unu haveno : la antikva Lacydon de la Grekoj. Sed jen tiu urbo rapide pligrandiganta, kiu kalkulas pli ol 500.000 loĝantojn en 1906. Ek de 1853 estis finkonstruata la baseno Joliette. De tiam la laboroj por pligrandigi la havenon neniam haltis. Navigaciaj kompanioj estis kreataj. Iliaj flagoj fluitas en ĉiuj havenoj en la mondo. Dum la sama tempo kreskas la komerco. La urbo fariĝas grande industria. Ekster la malnova zono de la remparoj, novaj uzinoj atingas la malproksimajn vilaĝojn.

Dank'al kompetenta administrado de sinsekvintaj urbestroj malaperis malnovaj kvartaloj kaj ĉe ilia loko, desegniĝas larĝaj avenuoj. Canebiere, legenda en la tuta mondo, fariĝas ĉefvojo inda je la grandaj bulvaroj, kiujn barono Haussmann donas al Parizo.

Multaj vizitantoj, miloj da pasaĝeroj, kiuj enŝipiĝas, povas admiri la belajn konstruaĵojn starantajn tie kaj tie-ĉi. Preskaŭ ĉiuj estis konstruitaj de 1870, sub la dua Imperio. Jen kun ĝia kolonaro la Borsodomo, en kiu troviĝas la « ĉambro de la korbo », kie okazas, matene, la valuta borso, vespere, la komerca borso. Jen la ma-

jesta hotelo de la Prefektejo kun belaj ĉambroj por akcepti la ŝtatestrojn okaze de iliaj vizitoj al la urbo. Bordo de la maro, funde de Malnova Haveno staras Imperia palaco Phora, donacita al la urbo de Imperiestri-no Eugenio. Ĉirkaŭ ĝin por kontempli la belegajn vidaĵojn al Manova Haveno, Canebiere, la urbo, la nova haveno. Vi povas halti, ripozi sur la benkoj de la apuda koketa ĝardeno.

Unu el la ĉefaj monumentoj de la urbo estas Palaco Longchamp, ĉe la finveno de Marsejla kanalo konstruita por ĉikondi la akvon de Duranco ĝis Marsejlo. Laŭ la planoj drititaj, la arkitektoj devis konstrui sur tiamanta monteto akvan kastelon, belan artan muzeon kaj biontologian muzeon. Felice tiun malfacilaĵon venkis la arkitekto Esperandieu. La tuto havas la stilon de Itala Renesanco. La ĉefa fasado, impona, rigardas la urbon. La centra paviliono, kie ŝprucas bela kaskado ampleksas vastan duociklon. Antaŭe tri kolosaj statuoj, Duranco, Tritiko, Vito, superirigardas turojn duonelakvigantajn el konkego. Malantaŭe, sur la plataĵo, agrabla publika ĝardeno kondukas la vizitantojn al zoologia ĝardeno.

Multaj preĝetoj tiam estis konstruitaj. Tiu nomita « Reformuloj » starigas en la ĉielo siajn du pintojn dum la katedralo ripozas, kvieti kaj majesta, apud senĉesa bruoj ĉiam kreskanta de la moderna haveno.


Superstarante ĉion, de la supro de monteto « Notre Dame de la Garde », la « bona patrino » konvenigas la gastojn de Marsejlo, dum la forlasantoj kontemplas per lasta ekrigardo tiun kolosan Sanktan Virgulinon kun ŝia infano. De la preĝejo placo de la baziliko, la vidaĵo etendiĝas de la montetoj Rove ĝis montaro Marsejleveyre, kun ĝiaj harmoniaj linoj, ĝiaj blankaj insuloj de suno inundataj. Tia mirinda panoramo instigas la turistojn fari promenadon laŭ la kornio, nun tre moderna, oportuna, belega. Ĝi instigas ankaŭ la turistojn al la vizito de la « calanques » (= golfoj) de la marmorea bordo, similantaj fiordetojn, profunde trancitajn en la montetaj kaj kruteĝaj klifoj, atingeĝaj ĉu per la maro, ĉu per la montaj vojoj kun vertigodonaĵoj sinuoj.

Kiam vi revenas apud Malnova Haveno, lasu iun el tiuj kriacemaj anoncistoj tenti vin per promeso de bela marpromeno. Iru ĝis insularo Frioul. Ĝi meritas la iradon. La vojaĝo komenciĝas per longa laŭro de Malnova Haveno. Malantaŭe montriĝas splendoro de marmoreca spektaklo de la urbo, la ĉirkaŭurbo, la zono de montetoj ĉirkaŭtermanta ĝin... Antaŭe fieriĝas arkipelago Frioul. Sur la insuleto If, staras kastelo If, famkonata. Malgaja estas la historio de tiu sinistra

monumento, malliberejo, kie logis inter aliaj l'Homme au masque de fer (Viro kun Fera Masko), Mirabeau, la 513 venkitoj de la revolucio « La Commune ». Alexandre Dumas ankarcerigis tie el siaj ĉefroluloj : Edmond Dantes kaj abato Faria. Denove la legendo superas la veron : la gardisto ne forgesos montri la ĉelojn de la du malliberuloj, la truon boritan de ambaŭ por ilia forkuro. La vizito daŭras laŭlonge de la novaj havenoj ĝis tunelo Rove.



Palaco
Longchamps



Nun, kun pli da konoj pri la urbo ni povas legi tiujn frazojn de Blaise Cendrars. Ni pli bone ilin komprenos :

« La mirindega destino de Marsejlo ne evidentigas al vi pli ol imponas vin ĝia fortuno, ĝia riĉeco aŭ ol mirkonsternas la modernismo de la unua franca haveno, la plej specialigita el la Mediteraneo, unu el la plej gravaj sur la terĝlobo.

Sturmita, rabita, incendiita de Sarazenoj, Normandoj, Hispanoj, Burĝonjanoj, plurfoje disrabita komplete, Marsejlo pluekzistas ĝiam sur la sama loko, pli feliĉa vivi, pli sendependa ol iam. Kia urbo !... »


F. GARRIGUE.

Apud Kastelo IF

(Foto René Simon)



Alternativo por la Esperanto Movado



Okazis tre ofte en la historio de la teknikaj progresoj, ke inventaĵo restis longe en la mallumo antaŭ ol la homoj decidigis uzi ilin grandskale. Kvankam Esperanto ne estas ĝuste inventaĵo sed ĝenia kreaĵo de nia Majstro, ĝi havas la saman sorton.

Esperanto-Asocioj, kiujn mi preferas ne nomi, fanfaronas ke ilia membraro kreskas, ke oni atingis tiun aŭ tiun rezulton, sed fakte, la samideanoj kiuj ankoraŭ posedas raportojn de Asocioj de tridek aŭ kvardek jaroj pli frue povas fari al si ĝustan ideon pri la pretenditaj progresoj. Eĉ se malgranda kresko de la anaro ekzistis, oni atentu, ke post duono da jarcento, la internaciaj intersanĝoj (kiuj ankoraŭ ne uzas nian lingvon) large multobligis. Multegaj institucioj rilatantaj kun la tuta mondo kreigis, la internacia komerco forte pligrandigis, la ĵurnalisma informado atingis gradon de vigleco ĝis nun ne konatan, la telekomunikoj pliintensigis, ktp... Do, la kompara stato de la mondo trafiko materia kaj spirita, kun la uzado de Esperanto montras grandan relativan malprogreson de la internacia lingvo.

La kialo estas simpla : ĝi estas la enfermiteco (por ne diri la sektismon) de la esperantista spirito. La movado kredas naive ke, iun tagon, dank'al la belaj kvalitoj de ĝia lingvo, la mondo simple venos al ĝi. Bedaŭrinde tiu kredo estas tute kontraŭa al la faktaj kaj al la ĝenerala historio de la disvolvigo de lingvo. La hispana lingvo konkeris plej grandan parton de Sudameriko pro militaj faroj. La angla lingvo disvastiĝis tra la mondo pro la komerco. La franca lingvo estis uzata ĉe la iama rusa nobelaro, kaj nuntempe ĝi restas bone konata de intelektuloj en germanaj kaj slavaj landoj ne pro politika trudo sed pro kultura fameco. Neniam lingvo fariĝis uzata pro belaj internaj kvalitoj, neniam homoj adoris gramatikon, eĉ simplan.

Ni nun revenu al Esperanto, kiu havas kiel amilon de konkerado ne internajn kvalitojn sed ĉefe la neŭtralecon, la kulturecan kaj servan utilecon. Antaŭ iom da tempo, mi havis la okazon montri la valoron de nia lingvo al tre kompetenta ingeniero. Li diris : « Ah ! bone, tiu afero de Esperanto, por mi kiu devas rompi mian kapon per peniga lego de teknikaj revuoj en fremdaj lingvoj. Ĉu vi havas librojn, revuojn en Esperanto pri elektrotekniko ? » Mi devis konfesi, ke tiajn ni ne havas, kaj li konkludis : « Do, bedaŭrinde, ne interesa por mi, via Esperanto ! » » Kaj simile, se mi turnus min al ĉiuj fakuloj, komercistoj, diplomatoj, ktp, ĉiuj dirus al mi : « Kion ni povas fari per via

Esperanto, kiu jam servas al nenio grava en la mondo ?

Kontraŭ tio, la samideanoj rebatas : oni devas komenci de la komenco, Esperanto jam donas kelkajn servetojn, ĝi havas sciencajn revuetojn, ktp... En la unuaj tempoj de la telefono ne multaj personoj havis hejman aparaton, do la servado estis ne granda. Tamen de la komenco la telefono estis se ne nombre sed laŭkvalite tute utila ; komercistoj kaj diplomatoj ĝin uzis ; la utileco estis evidenta. Male pri Esperanto, 70 jaroj post ĝia apero, ĝia utileco daŭre stumblas aŭ restadas sur tereno de provetoj. Kaj tio devenas de kolosa malkomprenemo de la samideanaro, kiu obstine restas enfermita en sia lingvo same kiel estus papua tribo en sia dialekto. La papuoj atendas, ke la mondo vizitos ilin, kaj nur kelkaj esploristoj venas !

Oni tralegu la esperanto-gazetaron kaj, se oni estas tute objektiva, oni konstatos, ke plej multaj el ili estas nur redaktitaj *por* esperantistoj kaj *por* esperanto. Ĉiam temas pri movado, grupoj, kongresoj, esperantoliteraturo, gramatiko, pioniroj kaj eminentuloj. Preskaŭ neniam estas artikoloj de ĝenerala intereso, neniam artikoloj, kies tradukado kaj represado estus ŝatindaj en aliaj naciaj revuoj. Ĉu oni ne povus pritrakti en taŭgaj revuoj temojn de tutmonda intereso, ekzemple : astronomiajn observojn, informojn pri meteorologio, kuracadon de malsanoj, edukadojn de infanoj, protektadon kontraŭ akcidentoj de metiaj laboroj, eblecojn pri importado-eksportado, ktp...

Jes ! vi diros, faru do ! Sed vi ne havos inter la esperantistoj sufiĉan legataron kaj vi fiaskos. Pri tiu argumento, mi revenas al la historio de la teknika progreso. Neniam nova progreso abrupte superregis kaj tuj forigis la antaŭan teknikon : Dum la komenco de elektrolumado oni daŭre uzis petrol-lampojn kaj gason. En la 10-a jarcento dumtempe la diligencojo kuradis paralele kun la fervojoj, same la ŝipoj havis velojn kune kun vapormasino. Pri la internacia lingvo estas same : en la nuna tempo la komercistoj, la diplomatoj, la teknikistoj kutimas uzi kun grandaj penoj kelkajn ĉeflingvoj. Se oni volus eldoni revuon aŭ libron kun tutmonda temo de intereso, oni elektu paralelajn kolonojn kun du aŭ tri ĉeflingvoj *kaj Esperanto*. Same, oni organizu internaciajn somerajn universitatojn, aŭ teknikajn konferencojn kun kapaiduloj kaj tri aŭ kvar laborlingvoj *inter kiuj Esperanto*.

Se tiaj aranĝoj ekzistus, neniu dubo estas, ke la intereso de la publiko al Esperanto rapide pligrandigus kaj ke la facila Esperanto venkus sur inter-

nacia tereno la ĉeflingvojn, same kiel la vapormaŝino venkis la velojn, same kiel la transistoroj estas venkintaj la elektronajn tubojn en la nuna epoko !

Kiu devas fari tiajn provojn de paralela uzado de Esperanto kun ĉeflingvoj ? En la komenco, la esperantistoj, ĉar nur ili povus tion efektiviĝi. Ekzistas sufiĉe da kapablaj personoj inter la esperantistaro por aranĝi plej seriozajn prelegojn aŭ verki tutsignifajn librojn, eĉ inter ili multaj eminentuloj estas plurlingvanoj. Por tio ili bezonus kuraĝi kaj estri sian porsperantan sovinismon. Estas vere ke Esperantistoj konsideras skandala la uzadon de naciaj lingvoj dum esperanto kunvenoj: Mi memoras, ke dum internacia kongreso, dum la delegitoj de Nacioj salutis la kongreson nome de sia registaro, venis reprezentanto de la Hispana ambasadejo, kiu kompreneble parolis hispane. Je tiu momento, mi aŭdis apud mi fortan grumbladon de samideanoj : ĉu li ne povus paroli en Esperanto ? Imagu pli grandan stultan sovinismon ! Ĉu, kiam oni organizis en Grésillon kurson de franca lingvo por eksterlandanoj *pere de Esperanto*, ni ne ricevis kritikojn ? Ĉu ankaŭ oni ne vidis en Grésillon personojn kiuj tendencis transformi la domon en esperantista monaĥejo ? Felice ke nia Prezidanto ne havas tiajn konceptojn ! Se la tuta esperantistaro volus konvinkiĝi, ke la sumo de siaj fortoj devas

esti dediĉita ne *por Esperanto sola* sed *por homaraj servoj per Esperanto*, la afero grandege progresus.

Oni eble rimarkigos : « Sed la interna ideo ? » Mi scias, ke la Majstro diris en Genevo, ke li forjetus la stelon se ĝi estus nura emblemo de praktikaj servoj. Sed la mondo evoluis de tiu tempo kaj nenio malhelpus la esperantistoj pledi plurlingve pri homaranismo. Dum niaj krizaj tempoj, kiam oni vivas en konstanta atmosfero de malamego inter popoloj, kiam gigantaj nacioj preparas armilojn kapablajn detrui la tutan mondon, ŝajnas ke estas larĝa vojo por Zamenhofaj pensoj eĉ preferinde en tradukoj ! Sed pri tio niaj bonaj esperanto-gazetoj silentas, ĉu ne ? Estas tiel pli ripozige, pli neaŭdace fari simpozion pri ata-ita, aŭ regali la ĝisostajn samideanojn per delikataj originalaj verkoj ! Aŭ restadi inter la kara esperanto-familio ! Aŭ disputaci inter konsilantoj de Asocio !

Jen, samideanoj, ne plendu pri la nesufiĉa disvastigo de nia afero, la mondo kondukas rilate al ĝi same kiel ĝi indiferentiĝas al la mondo, tute simple. Jen la alternativo : aŭ Esperanto restos fermita mondo kiu vivetos sur si mem, aŭ ĝi venos praktike en konkurado kun la plej uzataj lingvoj. En la dua kazo oni devos ofte miksiĝi kun neesperantistaj medioj sed la venko certe venos.

R. WATIER.

STRANGA PONTO



Inter la urbo Kure kaj la insulo Kurahashi nova ponto 172 metrojn longa transpasas la markolon. Por ĝin atingi la aŭtomobiloj devas superiri ĉe ĉiu bordo trietaĝan cirklan deklivilon.

Tiamaniere oni atingis la nivelon de la ponto uzante nur malgranda surfacon de tereno ĉe ambaŭ bordoj.

INTERVJUO

Kelkaj minutoj kun :

Roland DUPUIS

« Arto kaj vivo » estis la titolo de ĝuida programo prezentita okaze de la unua internacia Arta Festivalo, la 11an de Aŭgusto en Harrogate. Tiu programo estis tre kompleta kaj diversa kun scenoj, teatraĵo, muziko kaj ĥorkantoj prezentitaj de 29 amatoroj el 9 landoj. Finpreparita nur dum la kongreso, ĝi postulis grandan laboron de la organizantoj ĉefe de la gvidanto : S-ro Roland Dupuis.

S-ro Dupuis, talenta muzikisto, estas konata pro sia granda sinifero al Esperanto kaj ankaŭ pro sia bonega traduko : « Normandaj Rakontoj » de la franca verkisto G. de Maupassant. Li tute afable konsentis respondi niajn demandojn.

I. — *Vi jam de longaj jaroj loĝas en Skandinavio. Kiuj cirkonstancoj ebligis aŭ devigis vin vivi en la « malvarmaj landoj » ?*

Mi estis unuafoje en Skandinavio en 1934, unu semajnon nur en Stokholmo, okaze de la mondkongreso de U.E.A. kaj tiam entuziasmiĝis pri Svedujo, laŭ la temperamento kaj optimismo de miaj 24 jaroj. Nur longan tempon poste mi havis okazon konstati ke entute la landoj kaj popoloj estas proksimume samvaloraj. Mi reiris al Svedujo en 1939 por instrui Esperanton kaj fari prelegojn; sed pro la eksplozinta milito revenis al Francujo por resoldatiĝi.

En 1948, laŭ mia varma deziro mi fariĝis konstanta deĵoranto de la Eldona Societo Esperanto, Stokholmo, kun la tasko korespondi en diversaj lingvoj, libroteni kaj librokomerci, kiu laboro havigis al mi longedaŭran ĝojon. Tiu aktiveco ĉesis por mi fine de 1957 kiam la Eldonejo pro diversaj kaŭzoj devis transiri al Malmö.

Mi tamen restis en Svedujo ĉar mi havas 2 filojn tute alkutimiĝintajn al la nordo kaj povis fariĝi ŝtat-subtenata muzik-prelegisto. Tamen mi nun havas krom tio firman postenon kiel sekretario en import-firmo preskaŭ nur kun Francujo komercanta.

2. — *Ĉu vi venis al Esperanto aŭ ĉu Esperanto venis al vi? Ĉu vi konatiĝis kun Esperanto hazarde aŭ memvole ?*



Hazarde aperis al mi Esperanto : unuafoje kiam, kiel skolto eklerninta la hispanan lingvon, mi ĉeestis internacian tendaron de esperantistaj skoltoj en la Hispanaj Pireneoj en 1927. Mi tiam lernis nur uzu frazon : « la supo estas tre bona ». Sed en 1934 printempe, povis gvidi Cseh-metodan kurson en la Komerclernejo de mia naskiĝurbo Rouen, profesoro Julius Gluck. Tuj la demonstraĵa leciono min komprenigis, ke Esperanto kaj pro neceso, praktika utileco kaj pro la interna ideo nepre meritis disvastigon. Mi tre fervore eklernis en februaro 1934, trapasis ekzamenon « Atesto pri Kapableco » en febr. 1935 kaj instruis la lingvon en Nederlando 1935-1938. Aparte fruktodona kaj agrabla estis mia kunlaboro kun eminentaj gesamideanoj Andreo Cseh kaj Julia Isbrucker.

Tiu esperantista vivo donis al mi la eblecon i. a. ĉeesti 10 kongresojn de U.E.A.

3. — *Mi kredas, ke vi profesie instruas kaj praktikas muzikon. Ĉu via arto helpas vin en via poresperanta laboro aŭ ĉu Esperanto helpas al via arto ?*

Mi ne instruas muzikon. Sed lerninte pianludadon ekde la 6-a jaro mi tre longan tempon restis amatoro por fariĝi koncerta solisto. Tamen pli kaj pli kreskis mia amo al Chopin, Beethoven, Grieg, Tehajkowsky, ktp... — multe pli kiel ludanto ol kiel pasiva aŭskultanto — tiel ke mi havis la ideon fari kulturajn prelegojn kun piano-ilustrado, kaj krome lumbildoj, la tuto sinkronigata kvazaŭ filmo, tamen en pli « vivanta » maniero kaj kun vere proksima kontakto kun la publiko.

Tiu muzik-ekzercado estas ĉiurilate valoriga. Multaj Esp. societoj jen kaj jen invitis min

prezenti programon en plej diversaj cirkonstancoj. Esperanto donas al mi la okazon reliefigi kunvenojn en nia movado kiel pianisto. Sed ekonomian profiton donas preskaŭ nur la jam menciita ŝtat-subtenata laboro. Foje, kiam mi sentas favoran okazon, tiam mi diskrete aludas al ĝenerala publiko la paralelon de la universalaj Muziko kaj Esperanto.

En Bologna — mondkongreso de U.E.A. 1955 — kaj Harrogate, d : o 1961 mi certe trovis grandan ĝuon prezentante longe kaj ame preparitajn kulturprogramojn.

4. — *Ĉu vi ĝuas saman plezuron aŭskultante aŭ interpretante muzikon kiel legante esperantan literaturon, prozon aŭ poemon?*

Se plaĉas al mi difinita muzikaĵo, pentraĵo, literaturo esperanta aŭ nacilingva, mi mem eble ne povus diri kio donas al mi plej grandan ĝuon. Sed se iu muzikaĵo tre plaĉas al mi, estas por mi bezono ĝin tuj ekstudi, kvazaŭ ĝi devus fariĝi unu kun mia personeco, parto de mia mio.

5. — *Via traduko de « Normandaj Rakontoj » renkontis grandan sukceson. Ĉu ĝi estis via unua traduko?*

La Normandaj Rakontoj de G. de Maupassant estas mia tria traduklaboro. La du antaŭaj estas : « Rakontoj pri Nederlando » kaj « Norda Kanto » — pri Finnlando — de G. Duhamel, ambaŭ elvenditaj.

6. — *Kial vi elektis Maupassant kaj el la verkoj de Maupassant tute speciale tiun libron?*

En la elementa lernejo mi legis « La Ficelle » de Maupassant. En 1939 venis al mi la ideo traduki la Normandajn Rakontojn ĉar :

— al mi tre plaĉas la traduklaboro ;
— tiuj normandaj rakontoj povas esti legataj de ĉiuj kaj ili estas ege kortuŝaj. Al mi aparte plaĉas la fako ke ili 90 %-e estas aŭtentikaj. « La Ficelle » estas eble la plej valora el ili ĉar ĝi majstre pruvas la pereigan potencon de la mensogo.

— tiu mia traduklaboro farita precipe inter 1950 kaj 1952 en Svedujo donis al mi la impreson, ke mi daŭre vivas en la Normandio de mia junaĝo.

7. — *Oni trovas en la verko de Maupassant dialektajn esprimojn. Ĉu vi spertis specialajn malfacilaĵojn por traduki ilin?*

Kompreneble, dialektaj esprimoj estas apenaŭ tradukeblaj kun egala « suk-ekvivalento ». Sed tie kie traduko « perdas », ĝi povas kompenso « gajni » en alia okazo se la tradukanto povas aĝi sufiĉe libere.

8. — *En la antaŭparolo vi skribis : « principio estas suverena : ne traduki vortojn por ekzamenanto sed traduki pensojn por ĉiaj legantoj ». Ĉu estas pli facile traduki la vortojn ol la pensojn? Ĉu oni ne riskas perdi la tekston tradukante nun la « pensojn », kion vi fakte majstre faris?*

Estas pli facile traduki vortojn ol pensojn. Sed la uzado de pluraj lingvoj donis al mi la konvinkon ke la popoloj ne malofte uzas malsamajn vortojn por esprimi samajn pensojn. Tial estas nepre necese koni la fundon de la penso en la originalo. Alie oni ne povas precize traduki. Tio estas despli necesa ke foje la originalo entenas pli-malpli okulfrapan eraron.

Cetere : Laŭlitera traduko estas nepre peza. Kaj esperanto-tradukanto eventuale ne timu simpligi stilon ekzemple tiel komplikan ke ĝi tro embarasus la leganton en sama formo kiel la originalo.

Doni al Esperanto kiel eble plej fluan stilon estas bela tasko de tiuj kiuj propagandas por la lingvo kaj sopiras al ĝia fina venko.

9. — *Ĉar la pens-maniero kaj la esprim-maniero ne estas paralelaj en la nacioj, mi spertis ke estas malfacile fari precizan tradukon ĉar ofte mankas la esprimoj. Ĉu la problemoj estas la sama, kiam temas pri traduko en la universalan lingvon?*

Mi estas konvinkita pri tio ke traduki estas vere laboriga en kiun ajn lingvon. Tamen ĝi estas malplej malfacila... en esperanton, ĉar tie gvidas grandparte la logiko, kiu en la naciaj lingvoj ne estas tiel fidinda.

10. — *Ĉu vi baldaŭ prezentos al la esperantistaro alian tradukon aŭ originalan verkon?*

Mi preparas alian tradukon de fama romano, per kiu mi esperas iam surprizi la esperantistaro. Sed... restas diversaj problemoj solvotaj antaŭ tiu realigo.

Mi kore dankas al S-ro Babin pro la honoro de ĉi tiu intervjuo. Mi esperas ke miaj respondoj kontentigos malgraŭ sia iom konciza karaktero. Mi libere kaj konklude volas aldoni ĉi tie, ke tiuj du vere internaciaj, universalaj elementoj : Muziko kaj Esperanto estas ege valoraj, do ninte kaj daŭre havigante al mi noblan ĝojon kaj klaran celon, kio signifas : vivindan vivon.

Multe pli sur tiuj du kampoj mi certe pri-traktos kun vi se ni havos la okazon renkontiĝi ekzemple en Grésillon, la venontan semeron. Pri tio mi kuraĝas esprimi ĉi tie anticipe plej sinceran ĝojon.

EL IE EN LA MONDO

Pri la jugoslavia lernejsistemo



Fine de junio fermigas la pordoj de ĉiuj lernejoj en Jugoslavio kaj la lernantoj komencas ĝui dumonatan ferian libertempon. Tamen ekzistas kelkcent povruloj, kiuj ŝvitias en la varmaj tagoj komence de Julio, farante ekzamenojn en diversaj fakultatoj, kiuj pro troŝarĝo de la programo kaj de studentoj ne sukcesas ĉion solvi ĝis la fino de junio.

2.600.000 lernantoj de la elementaj lernejoj, 320.000 de la mezaj kaj faklernejoj kaj 100.000 studentoj pasigis sian tempon en lernejoj benkoj pasintan lernejaron: Laŭ la statistika registrado de la popolo en la jaro 1961 en Jugoslavio ekzistas pli ol 18.000.000 da loĝantoj, el kiuj 3.000.000 vizitas normalajn lernejojn, kio signifas, ke ĉiu sesa jugoslavo estas lernanto nur en lernejoj, ne konsiderante multajn vizitantojn de la vesperaj kursoj, organizitaj precipe de la laboristaj universitatoj, kies ĉefa zorgo estas ebligi aldonan instruitecon al personoj ne havintaj ŝancon viziti la normalajn lernejojn.

Laŭ la nova leĝo pri lernejoj, ĉiu persono en Jugoslavio estas devigata fini la elementan okklasan lernejon. Sen escepto. La leĝo ne liberigas de tiu devigo ankaŭ mense kaj korpe difektajn infanojn, por kiuj ekzistas specialaj lernejoj adaptitaj al lernejlaboro kun difektaj aŭ invalidaj infanoj:

La leĝo estas la imperativo en ĉiu organizita homa socio. Sed la vivo konas sian imperativon ankaŭ ofte la leĝo devas cedi. Ankaŭ la leĝo pri lernejoj devas toleri la ekziston de kvarklasa elementa lernejo en kelkaj malgrandaj vilaĝoj meze de grandaj arbaroj, aŭ sur altaj montoj aŭ sur rokoj de izolaj insuloj. Ne estis eble organizi nun tuj la okklasan tipon de lernejo kun ĉiuj bezonataj instruistoj por ĉiu objekto, en malgrandaj izolaj vilaĝoj por deko da infanoj. La principo estas: lernejo devas esti en ĉiu vilaĝo, estu eĉ tre izola kaj malfacile atingebla per trafikiloj. Sed pli suprajn klasojn de la elementa lernejo pli forta infano devas viziti, eĉ se tiu situas iom malproksime de lia vilaĝo. Nur gefilo de lumtur-kaj arbargardistoj lernas mem kaj faras ekzamenojn en la plej proksima elementa lernejo, ĉar tamen ne eblas organizi lernejojn por unu-du infanoj.

Dekses jarojn post fondiĝo de la nova Jugoslavio, la procento de analfabetoj tre falis. En la malnova Jugoslavio, en ĝiaj sudaj regionoj, analfabetoj atingis eĉ 90 % de la loĝantaro: Nun, analfabetoj ekzistas en la nordaj partoj de la lando nur tre malmultaj, en la tuta Jugoslavio ĉirkaŭ 20 %, kaj ili estas preskaŭ senescepte nejunaj personoj, olduloj kaj oldulinoj, kiuj obstine spitis al ĉiuj varbmetodoj kaj ne volis aliĝi al kursoj por akiri de la elementa skrib-kaj legokapablo.

La nombro de lernantoj estas granda, ni jam diris 3.000.000, sed ankaŭ la nombro de lernejoj

estas tre granda. En Jugoslavio ekzistas 15.000 elementaj lernejoj, 1.500 gimnazioj kaj faklernejoj, 22 artakademioj, 56 superaj kaj altlernejoj kaj 78 fakultatoj. Versajne, en la momento, kiam ĉi tiu artikolo aperas jam la nombro kreskos, ĉar ĉiutage estas fondita iu nova lernejo, precipe aperas kvazaŭ fungoj post pluvo, mezaj kaj superaj faklernejoj. La evoluo de la industrio kaj agrikulturo postulas novajn fakulojn, kaj pro tio nur en la lasta tempo estas fonditaj kelkaj faklernejoj en la fakoj, kiuj antaŭ la milito estis eĉ ne konsiderataj fakoj: Ekzemple supera statistika lernejo, supera lernejo pri piedvestaĵoj, supera ledista, supera administra lernejo.

La karakterizo de la tuta lernejsistemo en la nova Jugoslavio estas konstanta reorganizo. Diversaj, tre multaj leĝoj aperis ĝis nun, kiuj ŝanĝas kaj resanĝas kaj la tipojn de lernejoj kaj la lernej-programojn kaj la pozicion de la instruista personaro. Antaŭ 15 jaroj estis la plej grava kaj la plej urĝa afero fondi lernejojn, ĉar en vastegaj regionoj ekzistis eĉ ne unu, nun la kvalito de la lernejlaboro estas la unua zorgo de ĉiuj kompetentaj forumoj en la klerigsistemo. Sed ankaŭ la koncepto pri la kvalito ŝanĝigas. Guste en la plej lasta tempo du reformoj enportis la fudamentan ŝanĝon en la sferon de la lernejsistemo, ŝanĝon komprenitan fare de iom konservativa parto de la klerig-laboruloj-revolucia. Nome, la matur-ekzameno, entute ne estas ekzameno, sed iaspica disertacio. Lernantoj, post la sukcese finita lasta klaso de la mezlernejo, elektas la temon, verkas traktajojn kaj defendas siajn argumentojn antaŭ la komisiono. La nova sistemo estas por nun eksperimenta, kies daŭran aplikon pravigos la praktiko kaj rezultoj. Evidente la leĝdonanto per tia matur-ekzameno preferis demonstiron de la fakta scio kaj matureco de la lernantoj.

La dua revolucia reformo ebligas al multaj junaj homoj akiri la superan fakultatan scion, sen bezono prezenti dokumentojn pri la sukcese finita meza lernejo. Gravas la scio, ne la formalaj atestiloj. La scion pravas tiaj personoj eĉ la speciala ekzameno, kiu postulas de la kandidato vastan scion. En la unua jaro, kiam ekvalidis la nova leĝo, la rezultato estis tre nekontentiga. Tre malmultaj el la kandidatoj faris sukcese la pruv-ekzamenon. Sed nun ĉiuj laboristaj universitatoj organizis specialajn unu-jarajn kursojn por kapabligo de la kandidatoj. Nun la rezultato estas multe pli bona, sed tamen enskribigon atingas eĉ ne 20 % el la anonciataj kandidatoj, ĉar la pruv-ekzameno estas ege severa kaj postulema. La dinamiko de la moderna vivo kaj la evoluo de ĉiuj scienco-branĉoj postulas vastan kaj profundan scion de ĉiu instruata homo, ĉar -scio estas potenco!

EMILIA LAPENNA.

Kiam regas la malgranduloj

LA TERMITOJ

Kiam oni parolas pri la termitoj oni ĝenerale tuj vidas tiujn montetojn kelkfoje ses metrojn altajn kiujn oni renkontas en la tropikaj regionoj. Sed tiuj bestetoj vivas ankaŭ en Eŭropo, ĉefe en okcidenta Francujo, kie estas necesa konstanta lukto kaj protektado kontraŭ tiuj aviduloj.

Kial la termitoj estas tiom potencaj, ke la homoj estas devigataj organizi specialajn defendservojn? Ĉar ilia socia vivo ebligas ĉiujn entreprenojn.

Preskaŭ ĉiuj estas senflugilaj, kaj ili vivas en mallumaj galerioj de ili traboritaj en la grundo, la ligno aŭ aliaj materialoj. Ili estas blankaj kaj preskaŭ ĉiam blindaj.

La aktiva logantaro konsistas el laboristoj kaj soldatoj. Tiuj du grupoj distingigas ĉefe per la formo de la kapo. Rigardata de supre, la kapo de la laboristo estas ronda, tiu de la soldato pli longa kaj dika, kun mandibloj similaj al du kurbaj sabroj aŭ kun speco de kanulo elstaranta el frunta poŝo, kaj kiu elsprucas nocaĵon al la malamiko.

La laboristoj laboras pri la fosado de la galerioj, la konstruado de la nestoj, la riparado, la ekspluatado de la materialoj, la nutrado de la aliaj membroj de la socio. La soldatoj estas la policistoj. Ili defendas la socion kontraŭ la naturaj malamikoj, ĉefe la formikoj.


La soldatoj kaj laboristoj ne estas sensenskaj, sed iliaj seks-organoj estas « infanaj ». Ĉar la funkcio pri reproduktado estas afero de specialistoj. Ili estas nur du : masklo kaj femalo. Ili havas flugilojn, aŭ, pli precize, havis flugilojn ĉar ili perdis ilin.

De la unuaj tagoj la estontaj gereproduktantoj estis nutrataj de la laboristoj per speciala dieto. Post tempo venas al ili flugiloj kaj ilia korpo kovriĝas per malhela punktoj, kiuj permesos al ili « fronti » la taglumon. Ĉar ili, multnombraj, eliras el la termitejo. Tre rapide ili sin liberigas de siaj flu-

giloj. Multaj mortas. Aliaj renkontas kunulojn de la alia sekso kaj post ama postkurado, fondas novan socion. Nur post kelkaj semajnoj okazas la unuaj naskoj. La paro dikiga, ĉefe la femalo kiu baldaŭ similos blankan kolbaseton brun-strekitan kun eta kapo ĉe unu ekstremo. Ili estas nutrataj de la laboristoj. La novnaskitoj ricevas nutraĵojn adaptitajn al ilia estonta funkcio. En la varmaj landoj la paro estas « enĉambrigita » ĉe la centro de nesto konstruita sur la tero aŭ en arbo, el koto, argilo, siliko, ligno-fibroj, humo aŭ fekaĵoj.

Sed kial tiuj bestetoj tiel ŝata la lignon? Ĉar ili estas konsumantoj de celulozo. Tiu substanco estas neatakitita de niaj stomak-sukoj, ankaŭ ne de tiuj de la termitoj, sed ilia stomako entenas multegajn mikro-organismojn, kiuj digestas la celulozon kaj eltiras por ili la glukozon. La nutrantoj didonas sian salivon kaj nutraĵojn elfluigitajn : la stomodealon. Per sia anuso ili elĵetas specon de antaŭdigestita nutraĵo, kiu konsistigas veran frandajon por la « suĉinfanoj » kaj ĉe por la aliaj laboristoj : tio estas « socia ruminado ». La termitoj atakas ankaŭ aliajn substancojn ĉe ne celulozajn : la ledon, la lanon, la felojn, la ostojn, eĉ la eburon ĉar ili trovas en ili azotajn nutraĵojn. Feliĉe pluraj specoj de ligno : la tektono, la sekofo, la aŭstralia cipreso, la mahogono bone rezistas la atakojn de la termitoj. En Eŭropo, nun kelkaj, pro sia kemia konstituo ne estas tiom ŝatataj de la termitoj : la kaŝtanligno, la kverko-ligno, la fagoligno.

La homo, la forta, potenca homo, kiu pli kaj pli subjugas la naturajn fortojn longtempe restis senhelpa kontraŭ la termitoj. Nuntempe li povas efike agi dank'al kemiaĵoj, sed li estas devigata en la infektitaj regionoj uzi specialajn konstruimodojn por sin defendi kontraŭ tiuj etaj estuloj.



POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO :

Sendu viajn solvojn al :
S-ro P. CHEVALIER
19, boulevard G.-Lauriol
Nantes (L.-A.) - Francujo

Skribu vian kompletan nomon kaj adreson.
Aldonu la lastan banderolon de la gazeto.

UNEA PROBLEMO (20 poentoj)

Bonvolu anstataŭigi per la taŭgaj vortoj la punktojn en la ĉisuba teksto. Unu poento estas gajnota por ĉiu vorto bone trovita, sed atentu! Oni forprenos unu poenton por ĉiu vorto malguste elektita.

« Razpopovci estas malgranda vilaĝo... .. 50 domoj Laŭ ... situacio ĝi per nenio diferencigas ... la plejparto de la vilaĝoj, dissemitaj sur la nordaj deklivoj de la ... parto de la Balkanmontaro, famaj puraj domoj, bone ordigitaj kortoj kaj fruktĝardenoj.

Sed ĝi estas konata ... unu el la plej viglaj vilaĝoj ... la regiono. La Legosocieto kaj la teatro estis fonditaj en 1881... tri jarojn ... la liberigo de la lando la turka jugo. La unuaj aktoroj, ... vilaĝanoj, lernantoj, instruistoj fondis ankaŭ klerigan socion, ... specialan komisionon ... specon de ... konsilantaro, kiu devis difini la repertuaron kaj distribui la... . Dum kelkaj jardekoj prezidanto de la komisiono estis la instruisto Petkokoev, ... nobla figuro de kleriganto, kun bela gibla harbo, por ĉiam restis por ... en la memoro de ĉiu, kiu estis vidinta lin.

AMUJAJ PROBLEMOJ (de S-ro Jarlier)

Solve de la lasta problemo: :

Nombrado :

De 1 ĝis 9 estas unuciferaj nombroj, 9 ciferoj
t.e.
De 9 ĝis estas 90 duciferaj nombroj, t.e. 180 ciferoj
De 99 ĝis 300 estas 201 triciferaj nombroj, 603 ciferoj
792 ciferoj

Respondo : 792 ciferoj.

II. — Ni rezonos kiel en la antaŭa problemo
De la 1-a ĝis la 9-a pago oni bezonas 9 ciferoj
De la 1-a ĝis la 99-a pago oni bezonas :
 $9 + 180 = 189$ ciferoj
De la 1-a ĝis la 999-a pago oni bezonas :
 $9 + 180 + 2700 = 2889$ ciferoj
De la 1-a ĝis la 999-a pago oni bezonas :
 $9 + 180 + 2700 + 36000 = 38899$ ciferoj
La nombro de uzitaj ciferoj estas inter tiuj du lastaj nombroj.

2889 « 3987 » 38889

Do ĝi bezonas 4 ciferojn. La diferenco inter la nombro de uzitaj ciferoj kaj la nombro de ciferoj necesaj por 999 pagoj estas

$3989 - 2889 = 1048$ ciferoj. Tiu nombro permesas skribi $1038 : 4 = 262, 4$ ciferajn nombrojn. Do la libro entenas : $999 + 262 = 1261$ pagojn.

Respondo : 1261 pagoj.

NOVA PROBLEMO

La moneroj.

Oni pagas sumon de 780 frankoj per 50 frankaj kaj 20 frankaj moneroj. La nombro de 20 frankaj moneroj superas je « 4 » la nombro de 50 frankaj moneroj. Kiom da moneroj estas el ĉiu speco ?

DUA PROBLEMO



Sur la ĉi-subaj bildoj regas gajeco. Sel ekzistas 8 diferencoj inter tiuj du bildoj. Trovu ilin ; vi gajnos 16 poentojn.

8 diferencoj inter tiuj du bildoj. Trovu ilin ; vi

La homoj estas seriozuloj !

Minuton, mi petas.

Mi konsultas la dokumentaron



Mia edzo pravis... Mi preferas aĉeti ĉapelon.



*Kaj nun, mi vida ĉu la semajna horoskopo
pravas...*

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul. Petefijeva 27, ZRENJANIN.

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rødes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Złotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Uscno : S-ro C.A. Otto, 32 Hazelwood Rd., Blomfield (N.J.) (0,8 aŭ 1 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo